

Conrad Ferdinand Meyer,

## Du veloj

*tradukita de Guido Holz*

Du veloj ekhelas sur golfa lazur',  
du veloj ekŝvelas al paca forkur'.

Se unu ekrondas per venta alblov',  
la alia respondas per sama ekmov'.

Se unu impetas, duopas rapid',  
se unu kvietas, ripozas la amik'.

*Traduko de la Germana poemo "Zwei Segel" de CONRAD FERDINAND MEYER (Konrado Ferdinando Majero, \*1825-10-11 – †1898-11-28) en Esperanton de GUIDO HOLZ (\*1920 – †1989).*

*Arg-1088-2194 (2014-09-07 14:39:02)*

*Tiu ĉi poem-esperantigo troviĝas en <http://www.oocities.org/cigneto/thctxt/d/duvelojek1.html>. Pri Guido Holz vidu la retejon [http://eo.wikipedia.org/wiki/Guido\\_Holz](http://eo.wikipedia.org/wiki/Guido_Holz).*